



Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

Nº 8

Aŭgusto, 2013

Kara Leganto, jam okazis ankoraŭ unu societa kunveno dediĉita al nia multjara aktiva membro, prezidintino, senŝanĝa sekretariino de la plej proksima pasinteco d-ino Gertrude NOVAK. Prezidanto d-ro L. Kordylewski trovis en arkivejo 40-jaran foton de la E-Societo (1973), kie neforgesebla sam-ino Gertrude duonsidis en blanka robo (vd la foton). Simbole, ke nia membraro pligrandiĝis je tri novaj anoj, unu el novuloj – Randy – prelegos jam Septembre. Ĉiuj, konintaj s-inon Novak, ekmemoris interesaj momentoj de interkomunikado kun ŝi, ke preskaŭ ĉiam ŝi kunportis por niaj kunvenoj dolĉaĵojn, kukaĵojn – okaze de la lasta fakto ni manĝis fruktan torton kun vino (vd la duan foton). Grandan kontribuon al memorkunveno faris Gregory Dolgin. Kvankam li ne ĉeestis persone, sed sendis interesan informon kaj longan eseon, iam verkita ruse kaj nun speciale al ĉi kunveno tradukita E-e, parto de kiu aperas malsupre. Li menciis pri senavareco de G. Novak, kiu helpis al li finance por eldoni librojn, kiujn ŝi poste elaçetis kaj distribuis. S-ro Dolgin multfoje menciis Ŝin en sia artikoloj kaj eseoj, aperintaj en diverslingvaj eldonaĵoj ekde 1996. –La Redakcio



Interligoj de Kvin Kontinentoj

...Ĉikaga listo de l' partneroj mencias: pollandan Krakovon, israelan Petaĥ-Tikvo-n, tanzanian Njamaŝva-n... Parizaj impresoj mezuriĝas per tunoj, Krakovaj – per kvintaloj, Petaĥ-Tikvaj – per galonoj (ĉirkaŭ trilitroj), kaj Njamaŝva restas ĝis nun kvazaŭ en senpezeco. Strange, ja Tanzanio estas la plej vizitanta lando en Afriko. Tri el sep turismaj mirakloj de l' Mondo brilas ĉi tie: rezervejo Serengeti, monto Kilimanĝaro (5895 m.) kaj lago Viktoria, proksime de kiu kaŝiĝas Njamaŝva. Kie do estas intervjuo kun Kilimanĝaro, Serengeti, kun aliaj partoj de l' belulin' Tanzanio? Turistoj ĉagrenite konstatas, ke ĝirafoj, elefantoj kaj leonoj en Serengeti ne komprenas la anglan, kaj por pli multo de indiĝenaj gentoj: bantu, makonde, masai, njamvezi eĉ lingvo hispana iĝas kiel «ŝtono de l' ekstumbloj». Kaj Esperanto? Ĝi, kvankam ne 12-oble, kiel opiniis estimata Leo Tolstoj, tamen almenaŭ 2-oble pli facilas ol la hispana, 3-oble – ol la angla kaj 4-oble kompare kun la rusa.

Eksciinte pri tio, alia leono – Simba (kio en lingvo Svaĥili signifas «leono») posedis eĉ progresantan kurson de Esperanto, kaj invitis al la hejma lignofajro «kunfratojn» kaj «kunfratinojn» el Nova Mondo. Reeĥis kaj alvenis: s-ino Novak kaj s-ino Seastrom el Ĉikago, s-ro Springer el Novjorko kaj s-ino Armstrong el Kanado.

Bluokula s-ino Armstrong tuj ĉarmis galantan Simba-n. Post la tritaga rendezuo li proponis al la gastino sian maldekstran manon kaj koron, memkompreneble,

sian koron. Ni rilatu al tio malsevere: ne en ungegoj, tamen en fortaj manoj de tiu ĉi «leono» jam io troviĝis. Tamen deteni en la dekstra mano du edzinojn, kaj en la maldekstra nur unu – ja tio estas turmenta disbalanco! Sincere kompatinte al suferoj de Simba, la gastino, tamen, montris al li sian sennoman fingron, jam kun edziniĝa ringo. Simba ne povis esprimi similan proponon al s-ino Seastrom aŭ al s-ino Novak. Laŭ tanzaniaj moroj, nova edzino devas esti pli juna ol sia edzo, kvankam ne plie ol filino de lia unua edzino.

– Bonvolu ne supozu ke mi estas muzulmano, – diris Simba. – Post teroristaj aktoj en nia Dar-as-Salam kaj en Kenia Najrobi, islamo ne allogas min, sed male... Tamen mi scias, ke por kristanoj triedziĝo estas tabua...

– Ne ĉagreniĝu, – konsolis lin s-ino Seastrom. – Savon al via anim' promesas judaismo de falaĝoj en la najbara por vi Etiopio, – diris ŝi. – Ja kiom da edzinoj estis ĉe la reĝo Salomono, kiam, radiantanta sian belecon, reĝino Savskaja, t.e etiopa, venis al li?...

– Kaj kiom da edzojn havis poste reĝino Savskaja? – memorigis s-ro Springer.

Simba imitis, ke ties lastan frazon li ne distingis. “Ĉe vi amikeco estas nomata kiel frata. Kaj en mia familio – kiel fratina. Edzinoj miaj amikiĝas kiel fratinoj”, – diris li.

– Ĉu via familio enhavas tri aŭ kvar infanojn? – ekinteresiĝis s-ino Novak.

– Dume nur sep, – ĝustigis Simba.



– Ho! – ekkriis la gastoj. – Bonvolu akcepti de ni donacetojn por viaj infanoj... Kaj ekŝutiĝis, kiel el kornoj de l' fekundeco, ŝuetoj, ĉapeletoj, ludiloj, kajeroj, koloraj kraĵonoj, bombonoj... panon ĉiutagan donas al Simba panarbo, ankaŭ baobabo, en kies ombro Simba instruas al dezirantoj tajloran arton en lingvo Esperanto!

Samtage jenaj gastoj vizitis Njamuŝvan lazareton. El aliaj kornoj de l' fekundec' ekŝutiĝis: mikroskopo, stetoskopo, medicinaj instrumentoj, prinotadoj, k.t.p. Poste ilin invitis municipalo de Njamuŝva, al kiu gastoj prezentis ioman sumon por akiri la terenon kaj materialojn, ĉar oni promesis konstrui tie Esperanto-centron. (Konstrui decidis mem esperantistoj de Njamuŝva). La gastoj vizitis krome ĉi-lokan lernejon «*Makongoro*», kulturdomon «*Zinduka*». Ili interparolis kun esperantistoj-komencantoj, certe, pere de la Lingvo internacia.

Esprimante reciprokan afablon, la municipalo loĝigis la gastojn en ties plej bona domo. Ĉi loĝejon sanktigis ĉefa ŝamano laŭ nomo Mbeka. «Fumo de lignofajro pelas for moskitojn, kaj totemo pelas for kolerajn fantomojn», – diris Mbeka kaj pendigis ĉe peroneto de l' domo papavan kapeton. Ĉi kapeto, anstataŭ papavo, entenis fekaĵon de vespertoj. Kaj vere, totemo ne nur forigis kolerajn fantomojn, sed ankaŭ allogis bonajn spiritojn... Sekvamatene aperis tie unu el edzinoj de Simba kun pota de varmega, ĵus kuirita pilafo sur la kapo. Ŝin sekvis aliaj kapoj, portantaj fruktojn de fekundeco afrika. Ĉokoladkoloraj belu-linoj donacis al la gastoj ridetojn, fruktojn, suveniroyjn, pelerinojn «*kangas*».

Dek tagojn sur mirakla tero de Afriko plenigis sincera respekto al amikoj el Nova Mondo, ekzotikaj floroj, koncertoj, ekskursoj, fotado... El nokta savano aŭdiĝis leoparda muĝego, hiena rido, ario de babuino... Interfrapadis la tamtamoj: «*Neĝa krono de Kilimanĝaro kurtiĝas*»...

Ho, Afrik'! Dezertoj kaj savanoj...

La montar', ornamo de river'.

Ho, al vi tra nokt' kaj uraganoj

Iris hom' sen plendoj pri sufer'...

La disiĝo estis kortuŝa ĝislarme. Adiaŭis kun la gastoj tuta Njamuŝva, eĉ hejma ĝirafo. «*Kwa furaha kupokewa!* (kio en lingvo svaĥili signifas: «*Bonvenon denove!*»)), – kriis infanoj kaj plenaĝuloj.

«Ĥva, ĥva», – sopirĝemis la ĝirafo, klinanta sian longan kolon...

Prikantita de Livingston kaj Gumiljov, lulilo de *Homo sapiens* – Afriko droniĝis en sopiron.

Akompanata de Boeinga bruoj, s-ro Springer sonĝis Esperanto-centron, s-ino Seastrom vidis tra la dormo katolikan templon en centro de Njamuŝva, dormantan s-inon Armstrong portis en ĝangalon Simba, kaj s-ino Novak paŝe post paŝe ripetis supreniĝon al neĝa krono de Afriko, al Kilimanĝara pinto, supreniĝon, per kiu ŝi celebris sian 65-jariĝon 10 jarojn antaŭe. Verŝajne, la sonĝoj kondukis s-inon Novak ankaŭ en Afrikan Zairon, en Japanion, al Tibeta lando Nepalo, en Tailandon; kaj laŭ Amerika kontinento: al Brazilo, Hajana, en Aljaskon, laŭ aliaj terenoj, kies loĝantoj perceptis ŝin kiel anĝel-gardantinon... Sed ĉi-tempe Boeing' komencis subiĝi en ĉikaga flughaveno O' Hare...

Misio de s-ro Springer – fondinto de humana asocio ZAWADI, misio de liaj kolegoj Armstrong kaj Seastrom, certe, estas noblaj. Tamen fruktodona agado kaj sorto de l' doktorino Novak meritas apartan rakonton. En malproksima jam 1939 jaro usonanoj savis ŝin – tiam etulinon, ankaŭ ŝiajn gepatrojn kaj iajn aliulojn el jam bruligata en la milito Eŭropo. Humaneco iĝis por s-ino Novak, kiel viviĝ-senco. Multajn landojn vidis tiu ĉi mirinda virino. «Ĉu planas Vi viziti ankaŭ Eŭropon?» – pri tio preferindas ne demandi. Traŭmoj de infanec' ne forgesblas. Donu Dio, por ke io simila neniam ripetu! –*Gregory S. Dolgin*

Movadaj Novaĵoj

–Pasintjare franca esploristo kaj historiisto Christian Lavarenne ĉe la Universitato de Parizo sukcese defendis doktoran disertacion pri Esperanto kun la temo “Esperanto: Ĝia Interna Ideo en siaj originoj kaj kelkaj el siaj esprimoj kaj manifestiĝoj: helpo aŭ obstaklo en la disvastigo de la lingvo,” – *ESF*

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Anonimulo
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.**

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

27an de Aŭgusto – UKdEo en
Rejkjaviko

24an de Septembro – NASK per
okuloj de Randy Ream